

Heinrich Heine,
Teksista kanto

tradukita de Alfred Conzeth

Nenia larmeto en sombraj okuloj,
Jen sidas teksistoj, mizeraj povruloj;
Germana Praregno, mort-tukon ni teksas,
Kaj en ĝin trioblan malbenon ni plektas.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, la blinda, la surda,
Al kiu ni pregis en kredo absurda.
Ni vane esperis, ni vane predikis -
Li trompis simie, nin eĉ mistifikis.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Reĝo, al reĝ' de riĉuloj,
Ne vidas suferon de ni mizeruloj,
Li premas el ni ja la lastan et-pundon
Kaj lasas mortigi nin kiel fi-hundon.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al nia Patrujo maljusta,
Jen kie prosperas nur trompo embuska,
Jen kie ĉe putro nur morta kaduko;
Germana Praregno, jen via mort-tuko!
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,
Die schlesischen Weber

Im düstern Auge keine Träne,
Sie sitzen am Webstuhl und fletschen die Zähne:
Deutschland, wir weben dein Leichtentuch,
Wir weben hinein den dreifachen Fluch.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem Gotte, dem blinden, dem tauben,
Zu dem wir gebetet mit kindlichem Glauben.
Wir haben vergeblich gehofft und geharrt,
Er hat uns geäfft und gefoppt und genarrt.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem König, dem König der Reichen,
Den unser Elend nicht konnte erweichen,
Der uns den letzten Groschen erpreßt
Und uns wie Hunde erschießen läßt.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem falschen Vaterlande,
Wo nur gedeihen Trug und Schande,
Wo jede Blume früh geknickt,
Wo Fäulnis und Moder den Wurm erquickt -
Wir weben, wir weben!

...

Heinrich Heine,
Teksista kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe siaj teksiloj la dentojn grincante
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:
Ni teksas trioblan malbenon por vi
En vian morttukon, Germani'.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi surda Dio,
Infane ni kredis je la religio.
Ja vane esperis, atendis ni,
Simiumis kaj mistifikis nin Li.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu fireg' de l' riĉuloj,
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,
Ĉantaĝas la lastajn grošojn el ni,
Kiel hundojn nin pafmortigas li.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,
Kie nur prosperas la koterio,
Kie estas rompata ĉiu junaj flor',³
Kie regas de l' putro la odor' -
Ni teksas, ni teksas!

...

³aŭ: Kie frue rompas ĉiu flor',

Das Schiffchen fliegt, der Webstuhl kracht,
 Wir weben emsig Tag und Nacht -
 Altdeutschland, wir weben dein Leichtentuch,
 Wir weben hinein den dreifachen Fluch,
 Wir weben, wir weben!

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de ALFRED CONZETH (*1913-12-08 – †1998-05-16).*

Arg-243-492 (2004-06-02 21:43:47)

Alfred Conzeth vivis en Mettmann ĉe la germana urbo Düsseldorf. Li estis profesia presisto kaj korektisto ĉe la eldonejo Droste en Düsseldorf. Li mem eldonis Esperanto-broshurojn kaj diversajn tradukojn kaj tradukis ankaŭ mem. Li estis dum multaj jaroj la eldonisto de la informilo de la Esperanto-Societo de Düsseldorf, la "Radsaltanto". [Laŭ informo el la libro "Esperanto - ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf", eldonita en 2002 de Edeltraud kaj Max Hans-Jürgen Mattusch kunlabore kun la Esperanto-Societo Düsseldorf]

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17).*

Arg-243-490 (2005-11-20 17:47:50)

Deutschsprachige Fassung des Gedichtes, das ursprünglich mit der Überschrift „Die armen Weber“ in der deutschen Emigrantenzeitschrift „Vorwärts!“ am 10.07.1844 in Paris veröffentlicht worden war. In dieser Flugblattfassung hatte das Gedicht die Überschrift „Weberlied“. [Laut Netznachricht vom 27.05.04 des Heinrich-Heine-Instituts Düsseldorf, Frau Marianne Tilch.]

Navedo flugas kaj krakas teksil',
 Ni teksas senlace dum nokta trankvil' –
 Morttukon ni teksas, Germanujo, por vi,⁴
 Enteksas trioblan malbenon ni,
 Ni teksas, ni teksas!

*Traduko de la Germana poemo "Die schlesischen Weber" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-243-491 (2005-11-20 18:13:42)

Esperantigita de Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2001-04-08 laŭ la germanalingva teksto, kiu post la publikigo de la unua versio en la revuo "Vorwärts!" (= "Antaŭen!"), eldonita de germanaj fugintoj, estis diskonigita en Germanio sur flugfolioj. En tiu flugfolia versio la poemo havis la titolon "Weberlied" (= "Teksista kanto"). [Laŭ interreta informo de l' 27.05.04 de la Instituto Heinrich Heine, Düsseldorf, s-ino Marianne Tilch.]

⁴aŭ: Morttukon, ni teksas por vi, Germani',
 Trioblan malbenon enteksas ni.